



La Voĉo de Amikejo

Informilo pri *Senlime* kaj Esperanto en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

Senlime

Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno
Avec le soutien de la Communauté française**En cas de non-distribution, renvoyer à**H. Lentzen
Feldweg 20
BE-4701 KETTENIS
Tel. xx-32-(0)87-55.43.26
E-mail : lentzen@senlime.org**Editeur responsable****Responsa eldonanto +****Informoj en la franca lingvo:**

Tel. +32-(0)87/33.02.92

GSM +32-486-947.957

Mail: jacques@senlime.orgJ.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters
Esperantista Grupo de Verviers
BE-4800 VERVIERS**Informatie in het Nederlands****Informoj en la nederlanda:**

Tel. xx-31-(0)43-455.14.36

Mail: parren@senlime.orgP.H.H. Parren, Heimansstr. 16
NL-6285 AM EPEN**Informationen auf deutsch****Informoj en la germana:**

Tel. xx-49-2406-7809

Mail: hogen@senlime.orgK. Hogen, Schütz-v-Rode-Str. 43
DE-52134 HERZOGENRATH**Aperas kvarfoje en jaro kaj
rete elŝuteblas ĉe
www.senlime.org****Prezoj por BE, NL kaj DE :
Unuopa n-ro : 3 EUR
Jara abono : 10 EUR**Bonvolu pagi, prefere decembre aŭ
januare, **NUR** al la konto :**979-5327148-10**

IBAN : BE41 9795 3271 4810

BIC : ARSPBE22

(banque : Argenta)

de *Senlime*, 25 rue Pierre Fluche,
4800 VERVIERS, Belgio.La kotizo (nedevisa sed
bonvenigata) estas disigita de la
abono al la papera versio de tiu-ĉi
informilo (kompreneble pagenda).

**Ni invitas vin al la Ĝeneralaj Asembleoj
de Senlime kaj Esperantista Grupo Verviers
en Select (Kelmis), vendredon,
la 20an de februaro je la 19h30.**

Informas Jean-Marie *Jacques* XX-32-(0)87-330292
jacques@senlime.org**Tagordo**

- agadraporto de la (ĝenerala) sekretario
- financa raporto de la kasisto
- proponoj pri Senlime-statutŝanĝoj
(membiĝ-maniero, aliĝo al la Civito, kreo de vera A.S.P.C.)
- elekto de aliaj kunvenejoj (monataj, Z-festaj,...)
- diversajtoj.

Pri membriĝo al *Senlime*

Estas konate ke multaj homoj tute ne interesiĝas pri statutaj aferoj kaj
sen surprizo ankaŭ *Senlime* spertas tiun problemon.La lasta statuto de *Senlime*, kiu forviŝis la devigan aliĝkotizon,
antaŭvidis ke ĉiu membro iamaniere kunlaboras (ĉu per sia propra
laboro, ĉu per alia rimedo... ekzemple pago de kotizo) kaj ĉiujare
skribe konfirmu sian membrigh-volon.. kion preskaŭ neniu faras, el kio
rezultas ke Senlime praktike ne konas siajn membrojn.

Mi proponas ke ek de 2010 estu tri membro-kategorioj :

1. la administrantoj (kategorio ESTRARA)
2. la esperantistoj loĝantaj en E.M.R., kiuj sin individue aŭ ope
konatigas kiel membroj (kategorio EFEKTIVA). Ili estas la nuraj
membroj kiuj povas voĉdoni kaj devas kunlabori (aŭ kotizi).
3. La simpatiantoj (kategorio AMIKARA) : tiuj kiuj interesiĝas pri la vivo
de la asocio, inkluzive de la (konataj) membroj de la retlisto
«Amikejo».

N-B : se esperanto-grupo en E.M.R. Kunlaboras kun Senlime, ties
regulaj membroj povas aŭtomate eniri la kategorion 2 aŭ 3.

La ĝenerala sekretario.



Niaj programeroj lupee

detaloj pri anoncitaj prelegoj, vesperoj, festoj,...

Novaj karaoke-aĵoj de Senlime

Estas konate (ĉu ne ?) ke Senlime nun regule organizas sian propran karaokeo-n en Kelmis, fine de junio, agrabla maniero forlasi unu la alian por la feria periodo.

Sed karaoke kompreneble ne havas nur ludan celon, ĝi ankaŭ havas grandan kulturan valoron, se oni konsideras ke ĝi permesas konatigi eksterlandajn kantojn (kaj tiele kulturon) enlande... kaj inverse.

Sed eĉ plie ni povas konatigi la esperantistan kulturon kaj lingvon al neesperantistoj. Tiel karaokeo fariĝas lingvo-instruilo.

Jean-Marie Jacques prezentos al vi kelkajn ekzemplojn pri tia pedagogia uzo de karaokeo. Oni memoru ke la esperantista grupo Verviers antaŭ multaj jaroj prezentis en Vervierso radio-elsendojn pri esperanto, kun ero nomita "lingvo-plano" : kantoj en esperanto estis aŭdigitaj kaj la tekstoj klarigitaj (oni esperis, sed ne sciis ĉu la aŭskultantoj hejme rekantos la kanton... hodiaŭ, tiuj kantoj akiris karaokean formon).

Jean-Marie Jacques, kiu jam gvidis (kaj kreis) diversajn kursojn nun celas prezenti esperanto-kurson por muzikemuloj (kiu ne ŝatas muzikon?), ĉefe pere de karaokeoj.

Komplemente, li montros al ni kelkajn trovaĵojn (filmetoj k.t.p.).

01-16 19h30 BE-Kelmis, Select: "**Novaj karaoke-aĵoj de Senlime**", far' J-M. Jacques. Inf. jacques@senlime.org

Simboloj de judaismo

Ankaŭ nomita ŝildo, la stelo de David estas la plej disvastigita simbolo de judaismo. Ĝia origino estas sufiĉe malbone konata, sed ĝi ne havas rektan rilaton kun la reĝo David.



La plej malnova simbolo de judaismo estas la Menorah, kandelingo kun sep branĉoj, kiu troviĝis en la Jerusalema Templo. Tiu formo Y, laŭ la kabalo, verŝajne similas al la sep valoj de la delto de la riverego Nil; kaj ĝia sankta oleo, la konsekritaj akvoj de la Nilo kiuj neniam povis malhavebli.



Laŭ Zaĥaria, ĝiaj sep lampoj estas la okuloj de Dio kiuj observas la Teron. Ankaŭ laŭ Zaĥaria la kandelaron flankas du olivarboj kiuj havigas oleon al la lampoj.

Por scii plu pri tio kaj aliaj simboloj de judaismo, nepre ĉeestu la prelegon de Mathieu, nia historiisto, kiu sendube (kaj esperantistece) plej zorgeme pristudis tiun temaron.

03-20 19h30 BE-Kelmis, Select: "**Simboloj de judaismo**" (prelego de M. Schrymecker).

Paradiza ĝardeno vintre

Eble kiel mi vi ne ŝatas la vintron kaj la malvarmon, kaj dume preferus vintrodormi, precipe se la vetero – kiel ĉi-jare – estas iom dura. Sed kiu diris ke la vintro estas morta sezono? Ke dum kvin monatoj, de novembro ĝis marto, la ĝardenon oni senzorge forlasu?

De la belaj aŭtunaj foliaroj ĝis la vintraj floroj kun surprizigaj koloroj, preterpasante la viglajn tuŝojn de la beroj, la naturo prezentas al la ŝatanto, kiel José Jacob (emerita profesoro pri biologio), ĝardenon vivantan kaj altkolorigitan ankaŭ dum vintro!

Pasintjare ni vidis ĝin dum somero, nun li admirigos al ni per multaj belegaj lumbildoj variajn vegetalajn speciojn kiuj florumas dum la malvarma sezono: plantoj jaraj, bulbaj, staŭdaj aŭ grim pantaj, sed ankaŭ plej rimarkindaj arboj.

Plian fojon, José Jacob ne superŝutos nin per sciencaj klarigoj kaj ĝardinadaj konsiloj sed ĉefe promeniĝos nin tra lia ŝatata ĝardeno por simple admiradi la riĉecon de la dumvintre naturo. Nepre ne malĉeestu la spektaklon, aparte belegan kiel konfirmos tiuj, kiuj ĉeestis la unuan parton.

Kaj subŝtofitaj botoj, gantoj, ŝultrotuko, kaj tiel plu ne necesos en nia bone hejtigita kunvenejo: venu!

04-17 19h30 BE-Kelmis, Select: "**Mia vintra paradiza ĝardeno**" (prelego de José Jacob, kun lumbildoj).

ESPERANTO

Eŭregiona kalendaro 2009 (1/2)



Senlime publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĝi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontiĝoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de **Senlime**. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de **Senlime** nun regule okazas ĉiun trian vendredon de monato en kulturcentro "Select", Lutticherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro: Jean-Marie Jacques (jacques@senlime.org).

01-16 19h30 BE-Kelmis,
Select: "**Novaj karaoke-aĵoj de Senlime**", prezentitaj de J.-M. Jacques.
Inf. jacques@senlime.org

02-20 19h30 BE-Kelmis,
Select: **Ĝeneralaj Asembleoj de Senlime kaj V.E.G.** (kaj labor-kunveno).
Inf. jacques@senlime.org

03-20 19h30 BE-Kelmis,
Select: "**Simboloj de judaismo**" (prelego de M. Schrymecker).

04-17 19h30 BE-Kelmis,
Select: "**Mia vintra paradiza ĝardeno**" (prelego de José Jacob, kun lumbildoj).

05-15 19h30 BE-Kelmis,
Select: "**Kiom belas nia naturo**", prelego de Raymond Demarche, kun lumbildoj.

05-23 Trilanda renkontiĝo en Bonn (komuna foriro el Akena stacidomo je la 9-a h).
Inf. jacques@senlime.org

06-19 19h30 BE-Kelmis,
Select: nune tradicia **karaoke**.
Inf. lousberg@senlime.org



Pliaj kunvenoj en BE-Kelmis, Select, okazos la: **09-18, 10-16, 11-20 kaj 12-13** (Zamenhof-festo).

16-01 19h30 BE-Kelmis,
Select: "**Nouveautés-karaoke de Senlime**", présentées par J.-M. Jacques.
Inf. jacques@senlime.org

20-02 19h30 BE-Kelmis,
Sélect: **Assemblées générales de Senlime et V.E.G.** (réunion de travail).
Inf. lousberg@senlime.org

20-03 19h30 BE-Kelmis,
Sélect : "**Symboles de judaïsme**" (conférence de M. Schrymecker).

17-04 19h30 BE-Kelmis,
Sélect: "**Mon jardin paradisiaque l'hiver**" (conf. avec diapositives par J. Jacob).

16-01 19h30 BE-Kelmis,
Sélect: "**Comme est belle notre nature**", conf. avec diapositives par R. Demarche.

05-23 "Trilanda renkontiĝo" à Bonn (départ de la gare d'Aachen à 9 h).
Inf. jacques@senlime.org

06-19 19h30 BE-Kelmis,
Select: traditionnel **karaoke**.
Inf. lousberg@senlime.org



Réunions suivantes au Sélect, La Calamine (BE), les: **18-09, 16-10, 20-11 et 13-12** (fête Zamenhof).

Festo honore al Zamenhof

en Kelmis "kiel kutime"

Vere "kiel kutime" okazis nia Zamenhof-festo en Kelmis, antaŭ publiko malgranda sed ege interesita, en etoso aparte amike, eĉ familia. Kiel kutime ankaŭ, almenaŭ tri nacioj estas reprezentitaj.

Grava novaĵo: la komunumo Kelmis rajtigis nin flosigi la esperantistan flagon sur la fasado de la kultur-centro Select, flanke de la komunuma flago. Farite...



Tamen – pro ekonomia krizo kaj altiĝo de la prezoj – iomete ŝrumpiĝis la manĝo, kiu ne plu meritis la nomon "bankedo". Sendube ni devos venontjare pripensi alian restoracion kaj/aŭ pli altan prezon (la psikologia sojlo da 25 EUR = 1000 BEF, kiun **Senlime** tradicie respektas, absolute ne plu elteneblas).

Dum nia venonta ĝenerala asembleo okazu diskuto pri tio. Ĉu organizi Z-feston same kiel "trilanda renkontiĝo" ĉiujare en alia loko, ĉu trovi pli taŭgan sed konstantan salonegon? Ŝajnas ankaŭ ke la dato devus esti transŝovita je unu aŭ du semajnoj por tute ne kongrui kun (kaj

konkurenci al) la aliaj Z-festoj. La elekto de taŭga salono (por kulturaj prezentoj) en facile atingebla loko (proksime de stacidomo) ŝajnas ankaŭ absolute necesa... se ne tro paroli pri la kvalito de la restoraci-mastro !

Feliĉe la kultura menuo restis sufiĉe kontentiga. Post prezento de la evoluo de la loka situacio – de Neŭtral Moresnet/Amikejo – dum la jaro 1908, ni povis aŭdi la trian parton de la teatraĵo de Mathieu Schrymecker pri "Amikejo" (multaj homoj, eĉ esperantistoj ne sufiĉe konscias ke, ek de la unua kurso, la unuan jaron, 160 Moresnetanoj eklernis esperanton). Tiu-ĉi verko, post kiam Mathieu estos skribinta la konkludon, baldaŭ estos publikigebla (ĉu li publikigos ĝin aŭ ne estas alia demando).

Ni ankaŭ aŭdis diversajn ŝercojn zorgeme elektitajn, perfekte tradukitajn kaj vigle prezentitajn de Raymond Demarche.

Muzikantoj (ve ne muzikistoj!) ludis diversajn kantojn ĉefe esperantistajn, kristnaskajn aŭ pacamajn. Kompreneble «La espero» kaj du versioj de «La Vojo» programeris, sed ankaŭ la «Fromaĝ el Edamo», (fr)omaĝe al nia bedaŭrita Claude Piron, kiu dumvive tiom humure kantis ĝin (= «Etoile des Neiges»/ Neĝa Stelo). En la humura sfero ankaŭ aŭdeblis kaj kanteblis «Ludoviko», iama «tubo» de Ĝanfranko Molle. Kelkaj aliaj agrablaj kantoj kiel «The Ash Grove» [La bosko fraksena] kaj «Lili Marlen» ankaŭ ĉeestis. Okaze de Kristnasko ankaŭ ne malhaveblis kantoj kiel «Abio vi»

[O Tannenbaum] kaj «Mi revas pri hejm'», muziko el la filmo "Ĝojan Kristnaskon" (kiun **Senlime** surtekstigis en esperanto). Fine «Auld lang Syne»=«Pasintaj tagoj»=«Estas nur ĝisrevido» [Ce n'est qu'un au revoir] salutis la eliron de partoprenintoj.



Tiuj melodioj, kiujn ni ankaŭ karaoke uzas, iĝas pli kaj pli bone konataj de **Senlime**-anoj kaj amikoj... Ĉi-foje ne temis pri karaokeo sed pri muzikludado per moderna sintezilo alportita de J-M. Jacques, kiu eĉ mem ludis. Kiel komencanta muzikanto, li foje sukcesis bone ludi, foje tute male... sed tamen li sufiĉe surprizis la partoprenantojn kaj utile aldonis kelkajn klarigojn pri la ludado per sintezilo (kiun li prave prezentis kiel «muzika esperanto»).

Kion aldoni, se ne tion, ke multaj partoprenintoj ĉiujare revenas kaj bedaŭras ke estas nur unu Zamenhof-festo jare.

Fotoj sur nia yahoo-paĝo : <http://fr.ph.groups.yahoo.com/group/amikejo/photos>. Necesas aliĝi al tiu yahoo-grupo, do malfeliĉe ankaŭ al yahoo.

N-B.: tiu reta yahoo-grupo "Amikejo", same kiel **Senlime** kaj yahoo, neniel rilatas kun la alia reta ttt-ejo www.amikejo.org kiu kaŝas ("kontesteban") revuon "Koinos" favoran al seksrilatoj inter plenkreskuloj kaj seksmaturaj infanoj.

Konsiloj pri tradukado de kantoj

Senlime ege bezonas libervolaj tradukantoj, ĉu por film-surtekstigado, ĉu por kant-adapto, ĉu alicela. Ŝajnas al ni utile rememorigi kelkajn regulojn por bone traduki kantojn.



Estas multaj atentopunktoj kiuj ĝenerale rilatas al tradukado. Kelkajn mi mencias ĉi tie. Tradukado de kantoj tamen, estas io tute alia ol tradukado de prozo.

Tradukoj estu lingve seneraraj.

Oni observu la regulojn pri apostrofado. Oni ekzemple ne apostrofu adjektivon aŭ vorton kun akuzativa finaĵo. Nur apostrofu la o-finaĵon kaj la a de la artikolo (*l'*). La apostrofo povas aperi ankaŭ en la esprimo *dank' al*. Alispeca apostrofado estas kutime evitinda. Kelkaj eksperimentis pri la elizio de *-aŭ* (**ankor'*, **kvaz'*) aŭ pri la elizio de la komenca *e* de *esti* (**'stas*, **'stis*, **'stu*, ktp.). Anstataŭ tiu lasta elizio estas pli bone eluzi la verbigajn eblojn de Esperanto. Do anstataŭ *Ŝi 'stas bela* oni diru ekzemple *Ŝi tre belas*.

Tradukoj stile kongruu kun la originala teksto. Tio signifas ekzemple, ke se la originalo uzas ĉiutagan lingvaĵon, oni ne traduku tro literaturece per multaj neologismoj k.t.p.

Tradukoj estu vivipovaj per si mem. Legantoj kaj aŭskultantoj laŭeble ne rimarku, ke temas pri neoriginala teksto. Oni do konsciu, ke tradukado ne estas lerneja ekzerco por pruvi al instruisto la bonan komprenon de la originalo. Tiu ĉi konsidero havas kelkajn konsekvencojn:

- Se estas malfacile trovi rime kaj ritme taŭgan tradukon, oni ne timu iom alivortigi la ideon de la enhavo, elektante alian bildon aŭ komparon. Tradukoj ofte elspiras tradukitecon kaj torditecon se oni rigore tradukas laŭvorte.

- Oni ne sklave kopiu fuŝojn aŭ fuŝetojn el la originalo. Se la originalo uzas nevivajn, senkolorajn rimojn kaj komparojn, fuŝas pri akcentoj k.t.p., oni ne nepre kopiu ilin. Tradukoj emas esti iom malpli bonaj, malpli sukaj, ol la originalo, do oni ne maltrafu ŝancojn igi tekston pli ĝuinda por la aŭskultantoj. Aliflanke, oni kompreneble ne korektu "fuŝojn" ironie, parodie aŭ alicela intencitajn.

Ĉe tradukado de kantoj oni trovu kontentigan solvon por kombini ritmon, rimon kaj enhavon. Ofte oni ankaŭ trovu solvon por vortludoj, aliteracioj kaj aliaj komplikaĵoj. Ĉio ĉi estas tre temporaba. Konsciu, ke tradukado de nur unu kanto povas esti plurtaga lukto.

Kelkfoje povas montriĝi neeble taŭge kunforĝi la ritmajn, rimajn, enhavajn kaj aliajn nuancojn. Ankaŭ povas esti, ke la originalo

enhavas tro da kulture specifaj aferoj kiuj estas nekomunikeblaj al internacia publiko. Tiam oni konsideru iom pli draste ŝanĝi la enhavon, por ke la traduko iĝu tamen interesa. Eble oni petu helpon aŭ konsilojn de kolega tradukanto. Alia konsidero estas, ke eble estas pli bone rezigni ol fuŝi.

Ne hontu, ke alia sperta esperantisto kontrolu vian tradukon. En Esperantujo bedaŭrinde eldoniĝas tro da diskoj en kiuj svarmas lingvaj eraroj kaj malglataĵoj. Prefere ne regalu vian publikon per plia tia disko!

Roel Haveman

Aliaj precizigoj sur la ttt-ejo:
<http://www.tekstoj.nl/esperanto/konsiloj.htm>

Notoj:

La tradukado de kanto estas la unua - kompreneble plej necesa - parto de la laboro por karaokeigi kanton en esperanto.

Senlime disponas pri la necesaj softvaroj kaj kapabloj, sed ne disponas pri ĉiuj muzikoj. Kelkfoje eblas mem ludi la muzikon (plej ofte taŭga partituro absolute necesas).

Se vi volas trejniĝi kaj konas la valonan dialekton, traduku la «Verviersa Barkarolo»-n (vidu p. 6) kaj transdonu vian laboron al ni : ni finos ĝin !

P.S. Ni ankaŭ disponas pri la «Valeureux Liégeois» (Fr + Eo)

Verviersa **A**ngulo

Verviersa **E**speranto **G**rupo

Barcarolle Verviétoise

Appel aux traducteurs !

Comité de V.E.G.:

Président: J. Jacob
19 Chemin de la Rostibouhaye
4910 POLLEUR (THEUX)
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: D. Lousberg
25 Rue Pierre Fluche
4800 VERVIERS
Tél. 087/ 087/222030

Secrétaire: J.-M. Jacques
5 Rue Joseph Wauters
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

V.E.G. dépend de l' Association pour
l'Espéranto (A.P.E.)

M. Delforge
16 Rue des Glacières
6001 MARCINELLE

Cotisations

Les espérantistes et sympathisants
sont cordialement invités à soutenir
notre programme d'action en versant
dès aujourd'hui l'une des cotisations
suivantes au compte

n°: **000-0245571-64**

IBAN: BE29 0000 2455 7164

BIC: BPOTBEB1

(Banque de la Poste)

de:

Esperanto grupo

25 Rue Pierre Fluche

BE-4800 VERVIERS

*La cotisation de Senlime est
maintenant facultative et laissée à
l'appréciation de chacun (mais
l'abonnement à ce bulletin en version
«papier» reste payant : 10 €).*

D'avance, merci à tous !

A.P.E. 2009 (EGV) 14 €

U.E.A. 2009 (MA) 59 €

Senlime (abonnement 2009) 10 €

**en indiquant le nom du membre
cotisant, le bénéficiaire, l'année
«cotisation de pour».**

Si vous êtes Verviétois ou si vous vous y promenez parfois, vous avez certainement remarqué le carillon répétant inlassablement la même mélodie...

La « Barcarolle Verviétoise » de Corneille Gomzé, datant du 19^e siècle, fait véritablement partie du folklore (wallon) Verviétois. Le carillon, vous pouvez l'entendre sur notre site internet à l'adresse: <http://myspace.voo.be/jeajacques/si/Monument.html>.

Si vous voulez chanter la chanson avec nous en espéranto, venez au karaoke ou à la fête Zamenhof de Senlime (Jean-Marie Jacques a créé une «truculente» version de la mélodie sur son synthétiseur).

Mais d'abord, à vos plumes, pour la traduction en espéranto !

I

So noste air qu'on rosinêye
Tos lès djous qu'on s'atavelêye,
Dj'à sèyî bèle cupagnêye,
Du mete ci refrain-voci :

II

Nos n'avans rin èl makète.
Vèrvî c'noh quu l'plokète.
Mais, foûs d'one pê d'bèrbisète,
Quu n'fait-i donc nin moussi ?

III

Inte lès bruts du nos fabriques,
Tchèstès pleins du mécaniques
Hoûtez donc quêne bèle musique
C'est Vieuxtemps qui d'jowe
ainsi!

IV

Totes lès fleurs du nosse valêye,
Sêpes ou dobes, bèles ou
djolêyes,
Qu'a printimps on veût florêyes,
A l'djeûne n'ont rin catchi



V

A mitant d'on grand carnadje,
Qwans lès canons fint ravadje
Djardon, came on vrai savadje,
Sabréve a brès' rutrossîs.

VI

Nos polans bin lèver l'tièsse,
Câ lu Liberté qu'on c'tchèsse,
A s'grand martyr so nosse plèce
Adjunians nos d'avant Chapuis !

VII

Nos avans, sins qu'on n'i pinse,
On tereû quu l'providence
A covrou d'one bone sumince ;
Biolley n'est nin co roûvi !

VIII

N'acontans nin lès marotes
Qui tchafetet hâr ou bin hot'.
Lu drapa dèl Polyglotte
Nu pout nin èsse mi tchûzi

Rekantajo

Oh ! Por mi, dju so fir
Quand sj'so-st-à l'étrandjir
D'aveur sutu hossi
En on trô come à Vervî !

Corneille **Gomzé**